EAB **Update** ☆ **Ĝisdate**

www.esperanto-gb.org

A quarterly organ of the Esperanto Association of Britain
Kvaronjara organo de Esperanto-Asocio de Britio
No. 52, January–March 2011 ★ N-ro 52, januaro–marto 2011

ISSN 1741-4679

International communication without discrimination ★ Respect for all cultures
Internacia komunikado sen diskriminacio ★ Respekto por ĉiuj kulturoj

Language Show with 'substantial knock-on effect'

I did a stint on the EAB stand from 11 to 6 o'clock on the Saturday and what struck me was how much interest was displayed by the passing public and how little hostile reaction to Esperanto was encountered.

Ten times more people

Opposite us was a stall from the University of Strathclyde selling their language courses, and I felt quite sorry for the chap on duty there since we (EAB) had something like ten times the number of people who stopped for a chat than he did.

Personally, I had many interesting conversations with the public, and their questions were often intelligent. I remember one conversation on the issue of register and idioms in Esperanto.

'Hats off!'

The item on the stand that really seemed to draw interest was the

Continued overleaf

Photo by Penny Nicholas

EAB's stand at the annual London Language Show in Olympia

• German council uses Esperanto in campaign against racism

(see pages 15–16)

• Porsche / Renault: Excessive use of English retards the car industry

(see page 7)

display of Springboard posters. Hats off to those who produced the posters, teacher Angela Tellier and office administrator Viv O'Dunne. And hats off to EAB for spending some of their money on having a stand.

Long may EAB have a presence at this show. It provides an excellent opportunity to inform language teachers and language enthusiasts about Esperanto. The knock-on effect is incalculable but I would guess substantial, since many of the visitors would be opinion-formers.

Often people just stopped at the stand and started to look at the display, so it was easy to then engage them in conversation. But I also found that if you just addressed a passer-by in Esperanto (*dirante kion ajn*) this would serve as a hook, and they then chatted for several minutes.

Among the volunteers manning the stand were Marteno Miniĥ from Slovakia (*photo on front cover, second from right*) and Saŝa Murr from Ukraine (*second from left*). Magnus Henoch, from Sweden, also assisted, making this the most international EAB stand there yet.

Terry Watts

ĈU ANKAŬ VI VOLAS IĜI

DELEGITO DE UEA?

Se vi jam estas membro de UEA dum unu jaro kaj plenumas la ceterajn devojn, vi povas iĝi Delegito, Vicdelegito, Junulara Delegito aŭ Faka Delegito de ĝia Delegita Reto.

Plenigu la respondilon en la Reta Jarlibro aŭ elŝutu tiun ĉe ⊕www.uea.org/asisto.html, plenigu ĝin kaj sendu al via ĉefdelegito. *Nur* se mankas ĉefdelegito en via lando, sendu la plenigitan respondilon al la Centra Oficejo.

ALIĜU AL NIA RETO!

REDAKTORA NOTO

Perpleksige

Estas malfacile verki ĉi tion, des pli, ke temas pri afero de nescio. Mi parolas pri la mistera malapero de David Kelso ie ĉe lia suditala hejmo, kie li kutimis pasigi plurajn monatojn de sia jaro.

Ĉion, kion oni sciis komence de decembro, estas eble legi sur paĝo 4. Tio estas konsterne malmulta.

Mi tute malemis skribi ion ajn, ĉar mi ne volas, ke ĉi tio legiĝu kiel nekrologo. Mi ne profunde konas Davidon, sed krom niaj oftaj renkontiĝoj en Barlastono aŭ ĉe Brita Kongreso, ni du kunflugis al la Azia Kongreso en Barato. Mi – samkiel la aktivaj anoj de EAB kaj esperantistoj tra eŭropo – ŝuldas multe al lia laboremo por la Esperanto-movado skota, brita kaj internacia, i.a. en EAB, en SATEB, por NoJEF. Ni neeviteble rememoras liajn bruan afablemon, amon por alkoholaĵoj kaj ŝercemon, kvankam verdire li havis ankaŭ flankon obstinan, foje tro akran, sed ĉiam fine venkis lia klera komprenemo.

Jam la taskaro de EAB suferas pro manko de lia laboremo.

Ni alkroĉiĝu al la espero, ke la kurioza kaj perpleksiga afero baldaŭ klariĝos pozitive.

Feliĉan, prosperan kaj *aktivan* Novan Jaron!

Geoffrey Sutton

• Material for the **next issue of *EAB Update*** should be with the editor no later than 4 February.
• Materialo por la **venonta numero de *EAB-Ĝisdate*** atingu la redaktoron plej laste la 4an de februaro.

EAB-Update / *Ĝisdate* is a quarterly organ of the **Esperanto Association of Britain** / estas kvaronjara organo de **Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House / Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE.**
• ***Tel.* 0845 230 1887 / +44 (0)1782 372141**
• ***Fax / fakse:* on request / laŭpete**
• ***E-mail / rete:* eab@esperanto-gb.org**
• ***Websites / ttt-paĝaroj:* www.esperanto-gb.org www.esperantoeducation.com**

❑ **Membership** of EAB costs £25 a year (£20 concession); supporter or youth member £10 / Membriĝi en EAB kostas £25 pundojn jare (£20 rabatite); subtenanto aŭ juna membro pagas £10 pundojn.

☆

❑ **Material for *EAB Update*** should be sent by e-mail, computer disk (rtf format, please) or hard copy direct to the editor / **Materialon por *EAB-Ĝisdate*** oni sendu rete (formaton rtf, mi petas), diske aŭ papere rekte al la redaktoro: Geoffrey Sutton, 7 Clover Road, Aylsham, Norwich NR11 6JW; e-mail / retpoŝte: gsutton@computekmail.co.uk. Material may be in Esperanto, English, Welsh or Gaelic / Materialo rajtas esti en la lingvoj internacia, angla, kimra aŭ gaela.

❑ EAB also publishes the review *La Brita Esperantisto*, wholly in Esperanto / EAB eldonas ankaŭ la revuon *La Brita Esperantisto*, tute en Esperanto.

☆

❑ EAB is a registered charity (No. 272676) and an affiliated national association of the **Universal Esperanto Association**, which has official relations with the United Nations and Unesco / EAB estas leĝe registrita bonfara asocio kaj aliĝinta landa asocio de **Universala Esperanto-Asocio** ***(Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 Rotterdam, Nederlando. Tel. 00 31 10 436 1044; fax / fakse: 00 31 436 1751; e-mail / retpoŝte: uea@uea.org; www.uea.org)***, kiu havas oficialajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko.

☆

❑ The views expressed in *EAB Update* are not necessarily those of the Management Committee of EAB / La opinioj esprimitaj en *EAB-Ĝisdate* ne nepre estas tiuj de la Administra Komitato de EAB.

Illuminating talks and excursions

The 92nd British Esperanto Congress at Eastbourne from 8 to 10 April promises to be an enlightened, sunny event. The local MP has agreed to be the 'Honorary President' at our opening ceremony and buffet, and the Mayor will also be represented. The theme may appear disparate, but the opening talk by Sally Phillips should help to clarify connections between lighthouses, luminaries and light beings. The theme has encouraged the offer of a collection of interesting talks by good speakers.

Beachy Head lighthouse

Light and enlightenment

Our guest speaker from Holland, Ziko van Dijk, will be speaking on encyclopaedias for enlightening the mind. John Wells will speak about enlightening literature, and Paul Gubbins on an anthology by visionaries. Terry Page will give a scientific talk on light, and Ivor Hueting will introduce recordings of Zamenhof and Lapenna. We also plan a couple of surprise speakers.

We have included special sessions for beginners and are inviting students from the college to check us out. We anticipate a range of entertainment; country dancing, matching information about the planets to pictures – organised by Peter Bolwell, a play, swimming in the college pool, music and a new film. Two fringes are 'UEA delegates' and 'Should we restart the markolaj kongresoj?'.

Photo courtesy of www.visiteastbourne.com

Eastbourne seafront

Book early!

Eastbourne, the 'sun spot of the south', is a popular destination even in April, so we have reserved accommodation, including a complete hotel on the seafront, a few minutes' walk from the *kongresejo*. Please commit to the days you want on the booking form. At the moment no deposit is required, but you must book early.

Don't come only for the weekend, but take some holiday time to enjoy the treasures to be found in the vicinity. For those who like to be shown around, the three-day *postkongreso* offers a visit to the ruin of the first prefabricated building in England brought over from Normandy in 1066 – yes, the Hastings Castle, and picturesque old town. We will also take a trip on a steam train near Lydd, through unusual terrain, a marshy plain with cabins or rather, cottages.

"Ne la feliĉon serĉu!"

Pasintjare ĉe la tiujara Brita Kongreso de Esperanto en Llandudno, la inaŭguron vizitis lernejanino en la rolo de Alico en Mirlando por signi la tiean ligon kun tiu famulineto el la rakontoj de Lewis Carroll. Hazarde mi trovis ligon de Lewis Carroll ankaŭ kun la ĉijara kongresurbo Eastbourne. Mi esperas, ke la Loka Kongresa Komitato pardonas al mi mian petolemon, se mi citas el letero lia de 1897:

"… la serĉanto por feliĉo, kiam li jam elĉerpis ĉiujn aliajn rimedojn, iras, kiel lasta kaj senespera elturniĝo, al ia aĉa banloko kiel Eastbourne, kaj esperas trovi, en la enuiga kaj deprima kunesto de filinoj de pensionlernejaj instruistinoj, la feliĉon, kiun li malsukcesis aliloke trovi …"!

Nu, oni do eble ne serĉu en Eastbourne la feliĉon, sed venu praktiki vian Esperanton kaj progresigi la movadon en interesa, amika etoso.

Geoffrey Sutton

Eastbourne College – la kongresejo

For those with good legs a climb up the lighthouse is well worth the effort. We will also visit Rye. This is a small medieval town built on a conical hill surrounded by town walls and well preserved, including a delightful cobbled street. Afterwards, there'll be a visit to Herstmonceux Castle, its lovely gardens or the really fun hands-on science museum, which still houses a massive telescope from the time that the Greenwich Observatory was sited there.

For those who prefer to do their own thing, there are the Seven Sisters – a fabulous walk above the chalk cliffs often featured in calendars, the small and charming county town of Lewes (pron. 'Lewiss'), the Bluebell Railway and fabulous gardens, to the west of Eastbourne. To the north and east there are a variety of castles, including Bodiam – a moated attractive ruin in lovely countryside, Leeds Castle near Maidstone – a fine museum and extensive gardens with a magic maze. There's Bentley Motor Museum and Wild Fowl Gardens, and a whole lot more.

Sally Phillips

David Kelso

Skota esperantisto David Kelso, honorofica sekretario de EAB, bone konata en Esperanto-rondoj en Britio kaj aliloke, raportiĝis kiel malaperinta de sia partatempa hejmo apud Melito di Porto Salvo en suda Italio la 16an de novembro.

Li estis laste vidita de amikoj la antaŭan posttagmezon, ekpromenanta en la apuda pejzaĝo, kiun li amis kaj bone konis. Liajn havaĵojn kaj aŭton trovis najbaroj kaj polico kiel normale ĉehejme. Grandskala serĉado organiziĝis, ampleksante diversajn policanarojn, specialistajn montarajn savunuojn, teamojn de flarhundoj, kaj helikopterojn, sed la serĉado nun venis al fino post pli ol du semajnoj sen trovi ian signon de David. Aldone, detaloj pri David kaj foto de li aperis en la tut-italia televid-programo de RAI-3 *Chi l'ha visto?* (Kiu vidis ŝ/lin?). Dume, oni povas kaj devus daŭre esperi, ke David estos trovita ie, sendamaĝa, kaj niaj pensoj estas ĉe liaj familianoj kaj proksimuloj.

Ed Robertson

• *Ekde la 25a de novembro Tim Owen estas alelektita en la Administran Komitaton de EAB por helpi trakti la kvanton da laboro dum la foresto de David. Se vi havas demandon, pri kiu vi normale korespondus kun David pro lia ofico kiel sekretario de EAB aŭ de NoJEF, bonvolu sendi ĝin unuavice al la oficejo de EAB, kie oni povos redirekti vin al alia taŭga persono.*

Estis stimula semajnfina programo en Aylesford

Ekde la 1980aj jaroj, esperantistoj kunvenas aŭtune en Kent por partopreni en la Internacia Amikeca Renkontiĝo ĉe 'The Friars', ĉarma iama monaĥejo kiu ankoraŭ estas Karmelana (t.e. religia) komunumo, sed nun ankaŭ servas kiel konferencejo. La 'ĉarmo' datiĝas de 1242, do la ejo ne provizas per ĉiu moderna luksaĵo, tamen, kiel ejo por tranokti, manĝi kaj renkonti ĝi ja taŭgis – precipe kiam adaptemaj partoprenantoj kiel ni esperantistoj povas trovi alternativajn solvojn de okazaj malfacilaĵoj aŭ mankoj.

The Friars, Aylesford, Kent

Vigla kaj varia programo

La kunsidon ĉi-jare – oktobro 2010 – lerte organizis Anica kaj Terry Page, kun vigla kaj varia programo, en kiu ĉiuj kontribuis aŭ partoprenis. Malgraŭ la kunventitolo, ĉi-jare ĉiuj el la dek ses partoprenantoj vojaĝis nur el Anglio, tamen kvar origine devenas el pli foraj landoj, kaj aliaj parolis pri siaj spertoj ekster Britio, do ni ja ĝuis internacian kaj interkulturan etoson. Tra la tutaj tagoj kaj vesperoj, Esperanto aŭdiĝis kaj dum la laŭprogramaj sesioj kaj dum la manĝo- kaj kafo-paŭzoj, do Esperantio ja venis al Kent dum tiu semajnfino.

Inter la riĉaj kaj buntaj programeroj, Roy Simmons prezentis kolekton de Esperantaj poŝtmarkoj, Sally Phillips parolis pri siaj vojaĝoj kaj, kun Peter Bolwell, distris nin muzike. Terry Page strečis nian lingvoscion per ekzercoj, Ivor Hueting intervjuis Anan Montesinos pri ŝiaj 'izol-insulaj diskoj', kaj Kimie Markarian instruis nin pri la japana skribsistemo.

Tre agrabla semajnfino

Dum freŝa tamen suna posttagmezo ni ekskursis al loka arbokolekto 'Cobtree Manor Park' por ĝui la aŭtunajn kolorojn. Dum promeno tie ni hazarde spertis unu el la programaj temoj – 'Perdiĝo' – tamen dank' al la direkto-senso de 'homa birilo' Sally Philliips, ni retrovis la aŭtoparkejon kaj reatingis 'The Friars' ĝustatempe por ricevi teon kaj kukon.

Entute, la evento estis tre agrabla semajnfino, en ĉarma brita pejzaĝo, kaj kun stimula programo de Esperantaj diskutoj, prezentoj, distraĵoj kaj ludoj.

La venonta Internacia Amikeca Renkontiĝo okazos venontjare de la 23a ĝis la 26a de septembro. Por ricevi detalojn, bonvolu kontakti s-inon Anica Page (tra la EAB-oficejo, se necese).

Vilĉjo Walker

Grupaj vortludoj dum la semajnfino en Aylesford

Intensa agado ĉe ses universitatoj nikaragvaj

Kiel ero en la kampanjo 'Esperanto al Ameriko', Martin Schäffer kaj Mallely Martínez Mateos (prezidantino de Meksika Esperanto-Federacio) vizitis Nikaragvon de la 18a de februaro ĝis la 15a de marto pasintjare. Dum tuta monato ili havis la okazon informi pri Esperanto kaj prepari ontajn vizitojn. Surloke ilin helpis Eliette Esquivel, kiu komencis studi Esperanton nur fine de 2009 kaj kun kiu li konatiĝis pere de la retpaĝaro *www.lernu.net*.

Dum la monato ili proponis dimanĉan kurson en ŝtata institucio, prelegis pri Esperanto antaŭ ĉirkaŭ 20 instruistoj de mezlernejo, aranĝis du renkontiĝojn kun parolantoj kaj amikoj de Esperanto kaj kreis retpaĝon por 'Esperanto en Nikaragvo'. Krom multaj individuaj kontaktoj, ili parolis entute kun personoj de ses universitatoj, rilataj al lingvoj, kaj informis pri Esperanto. En unu universitato ili havis la okazon lasi flugfoliojn por disdonadi al studentoj. En alia oni invitis ilin prezenti Esperanton en la 'Foiro pri kulturo kaj amikeco' (oktobro 2010), kaj oni promesis al ni esplori la eblecon tie oficiale instrui Esperanton.

Eblas mone subteni la kampanjon, interalie per kontribuo al Fondaĵo Ameriko ĉe UEA (www.uea.org/asisto); EAB povas senkoste plusendi kontribuojn. Nepre menciu ĉe ĉiu pago 'Esperanto al Ameriko', kaj informu pri via pago al: stiftungmondo@gmail.com.

Laŭ informoj de
Martin Schäffer

Help for African students of Esperanto?

EAB from time to time receives book requests from African countries where English is spoken. Some members get similar e-mail messages.

Over the years EAB has sent teaching aids, dictionaries, magazines, etc. from the list of our own publications – not big parcels, because they don't always reach their destination, or if they get there, no one lets us know with a polite 'Thank you'. However, in lands where postage is very expensive and few people have access to a computer, we must make allowances.

This summer, EAB sent a packet of materials to Kenya and had a grateful acknowledgement:

29 October

Kara Estimata,

Mi ĝojas informi vin, ke la pakaĵo, kiun vi sendis al mi atingis bonorde. Hodiaŭ fruamatene mi ricevis bone. Mi returnas dankojn al vi, ke mi feliĉas tre multe, kaj miaj esprimoj iras al Renato (Corsetti), kiu kondukis min koni vian oficejon. Do refoje mi bezonas la libron Gerda malaperis *kaj aliajn librojn por mezaniveloj kaj tiuj progresantoj. Kvankam mi ĝenas vin, mi volas disvastigi la Esperantan lingvon tra tutkenjo.*

Deziras ĉion bonan al vi kaj vivon longan!

Danke,
Gilbert

Gerda malaperis is a well-known, modern teaching book, but is not one of EAB's publications. It could be purchased and despatched direct from UEA. Would anyone like to contribute to this valuable project? If so,

Well done Albert!

Albert Lindsay from Chippenham has been a tutor for all of the Esperanto correspondence courses, including the Elementary, Accelerated and Free Postal courses (FPC) for many years. Albert has provided abundant support to his students and likewise supported EAB's administration by providing regular communication back on their progress.

More recently he has tutored a small group of people from Bath U3A Esperanto group. Over the summer, four members – Andy Pepperdine, David Fuller, Joan Butler and Richard Phillips – actively worked through the lessons of the Free Postal Course to completion in October. David Fuller joined the post-beginners on the recent Course-You-Can residential weekend in Barlaston, and Joan Butler has progressed onto the Accelerated Course … so good work and thorough support from Albert has paid off in extending the number of people conversant with Esperanto.

please send a donation – however small – to EAB with a little note that it is for 'books for Kenya'. The EAB office will transfer the money to UEA and request despatch.

Renato Corsetti advises us not to send money directly to African students, but to let UEA transform it into books. What a good idea! Thank you!

Joyce Bunting

AŬTOINDUSTRIO **CAR INDUSTRY**

Porsche / Renault-Toyota malkovras, ke trouzo de la angla handikapas

La fama germana firmao Porsche preferas bonan germanan al malbona angla lingvo. Laŭ la ĵurnalo *Süddeutsche Zeitung* de la 15a de oktobro 2010:

"La konstruisto de sportveturiloj Porsche vetas por la germana por siaj internaj rilatoj. Ĝia uzado kreskigas la inventemon de la inĝenieroj kaj la kvaliton de la interŝanĝoj en kunvenoj. Inverse, ekscesa uzado de la angla perturbas la laboron, kiam tiuj, kiuj parolas, ne estas tiuj, kiuj plej kompetentas por respondi, sed tiuj, kiuj plej bone regas la anglan."

Laŭ la sama artikolo: "La sistema uzado de la germana ĉe Porsche konsistigas la ĉefan kialon de ĝia sukceso. Kiel konstatis lingvistoj kaj konsilantoj de la entrepreno, la angla montriĝas fakte handikapo, kaj tio je pluraj niveloj:

- kunlaborantoj blokitaj, kiuj ne plu esprimas sin dum kunvenoj;
- malprecizeco en la tradukado de detaloj, kies kompreno gravegas;
- malrapidigo, kaj eĉ haltigo de la laborprocezo, kiam nur la kunlaborantoj regantaj la anglan sukcesas esprimi sin, dum ili ne nepre estas specialistoj pri la demando;
- dosieroj ne pritraktitaj, misioj ne plenumitaj pro manko de sufiĉa kompreno de la enhavo;
- sed, ĉefe: la angla malhelpas la imagon kaj la inventemon de la inĝenieroj, t.e. fakuloj, kiuj konsistigas la forton de la entrepreno ...

Tamen, dum la sukcesoj de Porsche estas nekontesteblaj, ne nur sur la komerca tereno sed ankaŭ en la estimo ĉe la germanoj, pliparto el la grandaj germanaj entreprenoj iĝas anglalingvaj kaj eĉ nomas sin anglalingve. La uzado de simpligita kaj fuŝa angla tia, kia ĝi disvolviĝas en la germanaj entreprenoj, tamen estas faktoro de miskomprenoj kaj malkompreno kun gravaj konsekvencoj.

La fiasko de la usona superbazaro Wal-Mart en Germanio estas atribuebla al la fakto, ke ĝi trudis anglalingvecon: la bazaj dungitoj ne povis komprenigi siajn plendojn; la manko de motivigo etendiĝis al la tuta klientaro.

Trudo de la angla reduktis produktivon ĉe Renault kaj Toyota

Ricevinto de la mokpremio Carpette Anglaise (angla tapiŝeto) por 1999, premiita pro tio, ke li trudis uzon de la anglausona en la protokoloj de kunvenoj, kiam li estis prezidanto-direktoro de Renault (kiu ekkunlaboris kun Toyota en Japanio), Louis Schweitzer estis devigita nuligi ĉi tiun sian decidon. En 2001 la gazetara agentejo AFP informis, ke li lanĉis la Fondaĵon Renault por havigi stipendiojn al la japanaj studentoj por malkovri Francion kaj lerni la francan. Li ankaŭ deklaris: "La lingvo estis malfacilaĵo iom supera al tio, kion ni opiniis. Ni elektis la anglan kiel lingvon de la alianco, sed tio montriĝis handikapo kun ambaŭflanka reduktiĝo de la produktiveco."

Informis Henri Masson.

World Congress resolution to UN Association

"I have received this e-mail from the United Nations Association, which you might be able to use in EAB Update*." Brian Barker*

Dear Brian,

Thank you for your e-mail and for sending me a copy of the resolution passed by the recent World Esperanto Congress.

UNA-UK occasionally receives queries about Esperanto and I will make sure I pass on the details of the Esperanto-Asocio de Britio.

Bondezirojn,
Natalie Samarasinghe
Head of Policy & Communications
United Nations Association of the UK

The sixth 'Drondo' weekend

I participated in the recent Drondo weekend, number six, at Wedgwood Memorial College in Barlaston. It was my first time, though I had taken part in the Drondido weekend back in January this year; my first EAB event and indeed my very first time speaking properly in Esperanto.

Based on an Open Democracy Discussion Circle

Drondo – the name is a contraction of *diskut-rondo* – is a popular in-depth discussion weekend, where the exchange of opinions is conducted totally in Esperanto. Drondo is based on the English-language Open Democracy Discussion Circle, held at the Blue Mugge pub in Leek, over the past few years. It took place over the weekend of 22 to 24 October, the same weekend as the Course-You-Can post-beginners' language course.

This Drondo was led by Derek Tatton, the originator and usual host, and Tim Owen. Derek led the earlier sessions, discussing such topics as the global financial crisis, the new government's Big Society programme and religion versus aggressive secularism. Tim led the discussions on Saturday evening and Sunday morning, on whether house pets are members of the family and on our personal heroes. Notes on the themes were sent out before the weekend to give the participants some food for thought.

Great practise in comprehension

As a relatively new Esperantist, I must admit I found some of the topics a bit daunting, and the language level was very high. It was a bit like listening to Any Questions on Radio 4, but in Esperanto! But it was great practise in comprehension and I learned a lot at both the sessions and during the meal breaks. There was also some free time to browse in the Esperanto House bookshop and the Butler Library.

The next Drondo is due to take place during the 'Ni Festivalu' weekend in January in Barlaston. Maybe I'll see you there?

Michael Heary

Course-You-Can 2010: "hard work, but enjoyable"

During the October Course-you-can weekend, Malcolm Jones, our teacher of many years experience, made us work hard. I feel his method in helping us mere beginners was very good. His helpfulness in and out of class put us at ease throughout the weekend in Barlaston. It was intensive, which was good. This is the way I would prefer it.

I was impressed with my room: light and warm and, most importantly, clean. We were well looked after foodwise – simple, home-cooking with some old-fashioned dishes – quite delicious. Tea, coffee and biscuits were provided any time of day.

Which bus stop?

The only difficulty I had arose after I got off the train at Stoke. Which side of the street do I wait for the bus to Barlaston? I asked several people, even a bus driver. Incredibly, no one knew. The bus stop on the opposite side of the road had a few more people standing around, so I decided to have a look. As luck would have it, the person I asked the way to Barlaston was in fact going there himself – he was one of the 'Drondo' members. This was his third trip there. We had to wait about 45 minutes for the bus!

Varied levels

This was meant to be a beginners' course, but really I think there were only two true beginners: myself and one other person. Unfortunately, this other person left the course on the first evening, because of a problem at home. We had both completed the 12-lesson basic postal course. So I was on my own with a large lack of grammar and vocabulary which left me struggling a little at times. The other three members must have been at the intermediate stage or further. However, I can now see much more clearly what I need to do to further my studies.

"Busy and enjoyable weekend"

On both Saturday and Sunday we continued with varied exercises such as word-search puzzle, questions and answers in an interview, an amusing piece about a strange situation in a town street in Esperanto which we needed to translate/understand, a piece called *La mallerta vitrolavisto* (The clumsy window-cleaner), an exercise involving various incidents at different times on different streets to be marked on a graph, and an exercise and questions about the life of Eugene Miĥalski, with a CD for listening practice and answering questions.

It was a busy and enjoyable weekend with plenty of listening practice, as most people spoke in Esperanto even at mealtimes.

David Fuller

Easily bilingual

Dear Editor,

Here's a very new news story on the advantages of being bilingual: *www.bbc.co.uk/news/science-environment-11534481*.

We just have to tell people that Esperanto is the easiest way to become bilingual and get the benefit. Problem solved!

Hilary Chapman,
North Wales

Ĉu ĉiu universitato havu reprezentanton por Esperanto?

Estimataj,

En Britio, kiel en multaj landoj, la universitatoj povas ludi gravan rolon por disvastigi Esperanton. Antaŭ kelkaj monatoj mi parolis pri la alveno de Xiaojuan, nova sed bona parolanto de Esperanto el Ĉinio. Se ŝi trovus klubon de Esperanto ĉe ŝia Universitato de Warwick, tio estus bona por ŝi kaj bona por la movado en Britio kaj en Ĉinio. Lastatempe mi parolis pri eventuala Lingva Festivalo farota de unu grava kunlaboranto de la Ĉina Lingva Festivalo de 2010. Tiu festivalo, se ĝi okazos, estos ĉe la Universitato de Sheffield. Por ke Esperanto profitu je tiuj bonaj ŝancoj, necesas, ke la movado estu plifortigita en la universitatoj.

Laŭ mia scio pri la tradiciaj organizaĵoj de Esperanto, ne nur en Britio sed ankaŭ en Ĉinio kaj alilande, mi estas preskaŭ certa, ke ili ne kapablos organizi la sistemon bezonatan por ekigi sukcesan kreskadon en niaj universitatoj. Mi ankaŭ pensas, ke la tiel nomata junulara movado ne kapablos tion fari, se juĝi laŭ la rezultoj de TEJO en la lastaj jardekoj.

Bezonatas, laŭ mi, speciala, konkreta organizaĵo por okupiĝi nur pri universitatoj. Kiel starigi lokajn klubojn de entuziasmaj, Esperanto-parolantaj membroj en lokaj universitatoj?

Germain Pirlot statistikumas pri instruado de Esperanto ĉe la universitatoj dum jaroj, kaj tiu laboro estas bona, baza kaj bezonata. Humphrey Tonkin kaj Wim Jansen starigis specialan konferencon pri la temo 'Esperanto kaj Universitatoj' en Amsterdamo antaŭ la UK de Roterdamo, kaj tio estas bona paŝo. Lu Wunsch-Rolshoven substrekas la gravecon de taŭga celgrupo – tiu de homoj, kiuj parolas aŭ interesiĝas pri pli ol unu fremda lingvo – kaj tiaj personoj plioftas ĉe niaj universitatoj.

Britio, Usono kaj Aŭstralio estas cellandoj por studado de dekmiloj da azianoj kaj alikontinentanoj. Fortigi la Esperanton-movadon ĉe la tieaj altlernejoj povas havi fortan, altiran efikon por la novaj universitataj lernantoj de Esperanto tra la tuta mondo. Ke ĉiu universitato havu sian reprezentanton por Esperanto. Ke ĉiu reprezentanto sciu kiel helpi al novuloj lerni la lingvon. Ke ĉiu havu sian klubon, grandan aŭ malgrandan.

Kiel fari tiun gravan paŝon?

Dennis Keefe,
Universitato de Nankino

Kio estas via opinio pri Edukado.net?

"Kion vi pleje ŝatas en la nova retejo?" estas demando de Katalin Kovats pri la nun rekonstruita retejo Edukdo.net, kiu, "jam de 2001, disponigas uzpretajn materialojn, informojn kaj diversajn servojn por ebligi bonkvalitan kaj modernan laboron surbaze de tutmonda kunlaboro de Esperanto-instruantoj."

Multlingva <http://edukado.net/multlingvaj>, informriĉa, tiu retejo, konata pro sia sindonemo, kompetenteco kaj afableco, estas valora helpilo por kursgvidantoj, aktivuloj, komencantoj avidaj malkovri eblecojn de la multfaceta lingvo, perfektiĝi en kaj per praktika uzado, korespondi, interŝanĝi, trovi konsilojn, eventuale mem instrui ĝin.

Per nia kunlaboro kaj subteno, Edukado.net povas helpi demonstri, ke logika, pedagogia, ŝpariga vojo al instruado de la lingvoj en la tuta mondo devus komenciĝi per lernado de Esperanto.

MALLONGE IN SHORT

• ***Edukado.net*** **plene renovigita** Antaŭ du monatoj oni plene renovigis la porinstruistan retpaĝaron *www.edukado.net*. Oni invitas al krozadoj kaj elŝutoj.

• Kiu estas la oficiala lingvo de la firmao Sanofi-Aventis? Respondas Jean-François Dehecq, prezidanto-direktoro de la farmacia kompanio Sanofi-Aventis: "Certe ne la angla. Multnacia firmao estas entrepreno, en kiu ĉiu povas paroli sian lingvon. En kunveno oni bezonas la cerbon de la homoj. Se oni devigas ilin paroli la anglan, la anglosaksoj alvenas kun 100% el siaj kapabloj; la homoj, kiuj parolas ĝin bone kun 50%; kaj la plimulto kun 10%. Se ni volas esti ĉiuj anglosaksoj, ni ne miru, ke la gajnantoj estas la anglosaksoj." (Laŭ *L'Expansion*, nov. 2004, n-ro 691).

• EU pays lipservice to its 'European Day of Languages' Babel-like EU, with its 23 official

languages and over 40 regional tongues, yesterday marked a forthcoming European Day of Languages on 26 September with a speech delivered essentially in English.

The European Commission spokesman, while praising multilingualism and highlighting the benefits of languages for small businesses, kicked off his speech in English. But on hearing sighs at a media briefing peopled by many nationalities tried his hand at other tongues.

His go at German, French, Spanish, Italian and Polish won applause for a good try but grins for below-par pronunciation.

Likewise the statement announcing the multilingual celebration was posted in all European Union languages but with the calendar only in English. (source: www.timesofmalta.com/articles/view/20100924/world-news/world-briefs; see also http://edl.ecml.at/LanguageFun/LanguageQuiz/tabid/1873/language/en-GB/Default.aspx).

• Projekto Ĝemelaj Urboj
UEA delonge funkciigas Projekton Ĝemelaj Urboj. Ĝi celas disvastigi la uzon de Esperanto en kaj por tiu agado. La Komisiito de UEA pri la projekto estas s-ro Wu Guojiang (retadresoj: ghemelurboj@yahoo.com.cn kaj amikeco999@21cn.com; retpaĝaroj: http://gxemelurboj.wikispaces.com kaj www.gazetejo.org/eo/gxemelajurboj. La pasinta numero de tiu retgazeto raportis i.a. pri la 6a Esperanto-kongreso de Nordoriento kaj Interna Mongolio de Ĉinio, urbestrino kiu povas paroli Esperanton kaj akceptis Esperanto-delegacion de ĝemelurbo.

• Iom pri Esperanto en CNN
Fine de sia programo 'Connecting the World', la usona televida kanalo CNN Internacia dissendis serion de programeroj pri lingvoj kaj lingvaj demandoj. La 17an de septembro ĝi traktis ankaŭ Esperanton ene de dek-minuta elsendo. Interalie, la programo intervjuis la aŭtorinon de libro *In the Land of Invented Languages* (vidu n-ron 47 de *EAB Update*). Pri Esperanto oni demandis, kial ne estu nur unu lingvo, kaj kial ne Esperanto. Ariko Okrent respondis, ke unu lingvo implicas unu kulturon, kaj sekve iu ajn lingvo, kiu aspiras tiun rolon, tamen mem dissplitiĝos. Ŝi tamen agnoskis, ke Esperanto proponas solvon, kaj ke ĝi sufiĉe bone funkcias ("*does a pretty good job*") provizi per neŭtrala ilo. Responde al demando, la intervjuito diris, ke ŝi havas pasivan konon de la lingvo.

Stefan MacGill, kiu aŭskultis la programojn, komentis: "Konklude, ne negativa, eĉ modeste pozitiva. Eble ni ĝoju, ke oni turnis sin al relative sendependa intervjuito, kiu tamen estis bone informita pri la lingvo. Esperantisto riskus maltrafi la okazon per troa entuziasmo! Ni ne miru pri la obsedo je lingvoj naskiĝintaj el filmoj, efektive tia enkonduko necesas por ne tedi la publikon. Oni povus bedaŭri, ke la esenca diferenco inter Esperanto kaj la aliaj menciitaj lingvoj ne estis pli forte emfazita – pri la parolkomunumo malantaŭ Esperanto estis neniu parolo. Rimarkinde, neniu alia nefilma lingvoprojekto el la lastaj mil jaroj estis menciita. En dek minutoj oni ne povas aliri la demandon, kiel Esperanto trovu sian lokon inter la aliaj lingvoj nuntempe uzataj por internacia komunikado."

• Ĉu 113 homoj mortis pro lingva nekompreno?
Dokumentara filmo de la franca televidkanalo Canal+, elsendita la 22an de januaro 2010, atribuis la akcidenton de la supersona aviadilo Concorde al mankanta stego, kies celo estis teni la paralelecon de la radoj de la surteriĝa ekipaĵo. La teknikistoj, kiuj ne komprenis la dokumentaron en la angla, forgesis munti la stegon, kiun ili opiniis senutila kaj kies nepran neceson ili same ne komprenis.

• Leĝa rajto je propralingva dokumentaro en Francio
Laŭ komuniko de AFP (Agence France Presse), la franca sindikato ALTER de la teknika flugpersonaro de Air France finfine venkis en proceso kontraŭ la ĉefa flugkompanio de Francio en afero pri deviga uzado de la angla por teknika dokumentaro. La pilotoj ja scipovas la anglan sed postulas franclingvan tradukon de anglaj dokumentoj.

Some Esperanto Magazines 2011

Please send subscriptions for 2011 to Esperanto House (see p. 2). Cheques should be payable to 'Esperanto-Asocio de Britio'.

- ✯ *La Gazeto.* Cultural. Six yearly. £25.50
- ✯ *Juna Amiko.* For young Esperantists. Quarterly. £13
- ✯ *La Kancerkliniko.* 'Alternative' view of Esperantoland. Quarterly. £23
- ✯ *Litova Stelo.* General. Six yearly. £13
- ✯ *Monato.* High-quality, current affairs monthly. £44 (by air £47, by e-mail £26.40)
- ✯ *La Ondo de Esperanto.* General, social-cultural monthly. £35 (by air £39, by e-mail £11)
- ✯ *Scienca Revuo.* Quarterly. £19 (incl. membership of ISAE)
- ✯ *Laŭte.* Libertarian, plenty of reading. Six yearly. £14
- ✯ *La Jaro.* £5 (£7 by air)

The importance of being part of it

Back in 1962 when I became an Esperantist, one of my ambitions was to join UEA as an individual member. I wanted to be part of it, help and support it, internationally. I achieved this in 1965, and have since become a Life Member, but I still pay by being a member of Societo Zamenhof.

Most countries are not going through healthy times financially at present, and the situation is probably going to get worse before we see an improvement. This is at least one of the reasons behind UEA experiencing a big drop in membership last year.

There is full information on UEA and its work on its website *www.uea.org*. UEA now organises 'Malfermaj Tagoj' – just across the water in Rotterdam – for those who wish to acquaint themselves with its vital work for the Esperanto movement worldwide.

However, UEA's offices are always open to visitors – just as EAB's is.

Full UEA membership details appeared in the October issue of *EAB Update*. There is a summary here, on the right.

Geoffrey Sutton

Ligu vin kun la mondo Esperanta!

Ne forgesu aliĝi al UEA por la nova jaro!

• Vi povas pagi membrokotizojn de EAB kaj UEA kune

Kelkaj kotizoj de UEA por 2011

MG/Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado £8

MJ(-T*)/Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO* (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago) £20

MA(-T*)/Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto* £50

SZ/Societo Zamenhof: mecenata kategorio, kiu ne inkluzivas membrecon £100

Pagu al la brita peranto: EAB, Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Tel. 0845 230 1887. Pagiloj estu skribitaj al 'EAB' (ne al UEA).

Kongres-aliĝoj kaj aliaj pagoj
EAB (la peranto) povas akcepti pagojn per debetkarto, prefere ol kreditkarto (pro pagokosto), ankaŭ por la Universala Kongreso de Esperanto (UK) kaj la Libroservo de UEA. Por tiuj celoj la administrejo de UEA eventuale malfermos por vi personan konton ĉe la Centra Oficejo (CO) en Nederlando. Bonvolu noti, ke la kongresajn kotizojn oni ne fiksas en pundoj, do ilia valoro varias laŭ la taga kurzo. Estas plej avantaĝe aliĝi antaŭ la antaŭa jarfino. EAB kutime disponas pri kongresaj aliĝiloj kaj la Unua Bulteno de la UK.

☆ **Universala Esperanto-Asocio**
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Tel. 00-31-10-436-1044; retpaĝaro: www.uea.org

• Misradiado pro nuranglalingva dokumentaro
Komence de la jaro 2000, en la malsanulejo de Épinal, Francio, pro eraro en la programado de aparato kun nuranglalingva dokumentaro, 5 500 pacientoj suferis je ekscesa dozo (20 ĝis 30% troe) da radiado dum terapio. Kvin el ili mortis pro tio.

• Norvegaj kuracistoj pli bone memoras legaĵojn propralingve
Laŭ enketo de doktoro Pal Gubrandsen, publikigita la 30an de junio 2002 en la norvega ĵurnalo pri ĝenerala medicino *Tidsskrift for Den Norske Laegeforening* kaj anglalingve resumita ĉe la usona medicina retejo PubliMed (www.ncbi.nlm.nih.gov/pubmed/12555604), kuracistoj pli bone memoras informojn en sia propra lingvo. En tiu enketo, 114 skandinaviaj nefakaj kuracistoj (ĝenerala medicino) devis legi dekminute artikolojn en la angla jen surpapere, jen surekrane, kaj poste en sia gepatra lingvo, jen surpapere, jen surekrane. Ili devis poste respondi al ses demandoj.

Montriĝis, ke legado surpapera aŭ surekrana ne okazigas diferencon pri memorigo. Male koncerne la legadon en la angla aŭ en la gepatra lingvo: "Tiuj, kiuj legis en sia gepatra lingvo, havis signifoplene pli altan rezulton ol tiuj, kiuj legis en la angla."

En alia artikolo resumita ĉe PubliMed la 30an de julio 2001 ("Do Scandinavian Physicians Understand Each Other's Languages?"), d-ro Gubrandsen diris al la informagentejo Reuters: "Ni

Daŭrigo sur paĝo 13

Recent new books available from EAB's bookshop

• ***Please add 15% for postage and packing – minimum postage cost £1.50.*** *Cheques payable to 'EAB' please, or contact Esperanto House (tel. 0845 230 1887) to pay by debit (or credit) card. Go to http://www.esperanto-gb.org/eab/bookcat.htm for our full list of goods. EAB cannot stock all titles, but can order items for which you pay EAB in sterling. The UEA catalogue is at http://katalogo.uea.org*

La arto labori kune red. Detlev Blanke, Ulrich Lins. Roterdamo: UEA, 2010. 901 p., 26 cm. ilustrita. Panorameca kolekto de artikoloj kaj eseoj de 106 aŭtoroj, eldonita por festi la 70an datrevenon de la naskiĝo de eksprezidanto de UEA, prof. Humphrey Tonkin. £48.00

Beletra Almanako 7 (feb. 2010), ***Beletra Almanako 8*** (jun. 2010), ***Beletra Almanako 9*** (okt. 2010). Novjorko: Mondial, 2010. 149 p. Prozo originala kaj tradukita, poezio originala, eseoj, artikoloj kaj recenzoj. Po £9.30

Ĉashundo de la Baskerviloj Arthur Conan Doyle. Elangligis William Auld. Kaliningrado: Sezonoj, 2010 (2a eld.), 167 p., 20 cm. Unu el la plej famaj detektivaĵoj de Ŝerloko Holmso. £13.05

English–Esperanto–English Dictionary John C. Wells – vidu paĝon 20.

Esperanto Mini-Trio (pack) EAB, 2010. The *Esperanto Mini-Course*, *Mini-Dictionary* and *Mini-Grammar* books (matched set, 32 + 64 + 64 = 160 pp.), bundled together at an attractive. £5.99 (incl. p. & p.).

Facila skeĉ-albumo Bertram Potts Chapecó: Fonto, 1984. 112 p., 21 cm. Cent mallongaj skeĉoj por legado aŭ prezentado, de du personoj, taŭgaj por klasoj kaj klubvesperoj. £4.30

La hobito J.R.R. Tolkien Kaliningrado: Sezonoj, 2005. 224 p., broŝurita, ilustrita. Elangligis C. Gledhill (prozo) kaj W. Auld (poemoj). Mirfabelo de la aŭtoro de *La mastro de l' ringoj*, verkita antaŭ tiu trilogio. £15.65 (NB. Lasta stoko de la eldonejo).

Konciza klarigo pri landnomoj en Esperanto Anna Löwenstein Palestrina: 2009. 12 p., 12 cm. Persona opinio kiel prezenti landnomojn en Esperanto; kompleta listo de landoj kaj landanoj. £1.30

Lingvo kaj menso Noam Chomsky Elangligis E. Grimley Evans. Roterdamo: UEA, 2010. 188 p., 21 cm. Esearo okupiĝanta pri lingvosciencaj kontribuoj al studado de la menso, formo kaj signifo en naturaj lingvoj, naturo de la lingvo, lingvoscienco kaj filozofio, biolingvistiko. £8.20

Ridu kun ni 1 Kompilis Palmira Lukoševičienė. Esperanto-Klubo, 2009. 77 p., 21 cm. Amuzaj rakontetoj el diversaj landoj kaj popoloj, taŭgaj "por etuloj kaj plenaĝuloj". £5.50

Tri nigraj ŝipoj Margrit Vollertsen-Diewerge Elrusigis S. Hague. Erlangen: 2009. 32p., 21 cm., ilustrita. Ĉarma, instrua fabelo. En tri lingvoj (Esperanto, germana, rusa) kun akompana KD kun la tri voĉlegitaj versioj. £16.80



Anglaj prepozicioj en Esperanto J.W. Prent SATEB, Romford, 1987. 20p., 21cm. £1.00 (incl. p. & p.)

Conversational Esperanto – Ĉiutaga Esperanto (2nd ed.) Don Lord EAB, 2008. 228 p., 21 cm. A collection of short texts, mostly dialogues, written in lively, everyday Esperanto and designed for learners who would like to improve their fluency. £9.00

La origino de specioj Karolo Darvino Elangligis Klivo Lendon. Antverpeno: FEL, 2009. 431 p., 21 cm. Charles Darwin's *On the Origin of Species* el 1859 – malŝlosa verko, kiu influis ĉiujn vivosciencojn kaj estas la fundamento de la evolua biologio. £20.30

vere esperas, ke ĉiuj landoj sukcesos pluteni altkvalitajn medicinajn gazetojn propralingve." D-ro Gubrandsen diris, ke li ofte legas en la angla kaj ke li flue parolas ĝin, sed li agnoskis: "Mi malpli memoras kaj pli rapide laciĝas legante en la angla kompare al la norvega."

• Italoj akiris EU-subvencion
Itala Esperanto-Federacio ricevis subvencion de la instancoj de Eŭropa Unio (Tutviva lernoprogramo Grundtvig) por aranĝi seminarion pri eŭropa identeco dum la venontjara Itala Kongreso de Esperanto. La subvencio valoras proks. 35 000 eŭrojn.

• Ankoraŭfoje peticio
Oni petas subskribi la peticion ĉe www.thepetitionsite.com/1/esperanto-parolantoj-en-la-mondo.

• *The Baptism of Tsar Vladimir*
Norman Ingle has translated the Czech satirical poem on despotism and corruption *Křest svatého Vladimíra* by Karel Havlíček Borovský (1821–56) into English as a play from the Esperanto translation (1953, 2nd ed. 1996) by Tomaš Pumpr. Copies are available at £3 from: Norman Ingle, 87 Victoria Rd, Shoreham-by-Sea, W. Sussex BN43 5WR.

• Libere pensi
Internacia Kunliga Komitato de Ateistoj kaj Liberpensuloj havas retpaĝaron ankaŭ en Esperanto: www.cilalp.org. ❑

Fotoj: LinguaForce

Komerco: Jahurtoj Sojasun en Esperanto

Ĉe la ekspoziciego SIAL, kiu la pasintan oktobron okazis apud Parizo, la firmao Triballat ekspoziciis pakaĵojn de Sojasun kun tekstoj en Esperanto. Temas pri prototipo, kiu estas kandidato por novigpremio. En artikolo de la septembra numero de la faka revuo *CFIA*, Olivier Clanchin, estro de Triballat, klarigas: "Konsideri la morgaŭon signifas ankaŭ konstrui eŭropan kulturon. Kiam oni parolas pri 'eŭropa kulturo' temas ankaŭ pri 'komunikado' ... Ni ekopiniis, ke Esperanto povus esti modelo."

Kiam … oni ironias pri Esperanto, la estro ekridetas: "Nu, ankaŭ ĉi-kaze, same kiel por 'bio' kaj sojo, ekzistas homoj, kiuj deziras kredi je ĝi. Ni kredis je la aliaj projektoj ... do Esperanto, kial ne? Tio indas, do oni provu. Estas pozitive preti sukcesigi defiojn!

"La entrepreno estas bona vektoro por testi tiun koncepton…

"Ni ne forgesu, ke ni estas Eŭropo 27-opa. Se ni havus komunan lingvon, tio plirapidigus multajn demandojn. Krome, en la logiko de daŭripovo, tie, kie oni parolas pri malpligrandigo de pakaĵoj, kiel fari per tiom da lingvoj kiom da landoj, kiam oni volas eksporti unusolan produktaĵon? Kiam oni aĉetas hejmajn aparatojn, kiom da kilogramoj da papero estas, da manlibroj en iuj lingvoj? Esperanto estas la sola justa lingvo ... ĉar neniu naskiĝas kun ĝi..."

From the Library Report The most remarkable statistic is that since August the readership of the humble library newsletter has increased by no less than 25%.

The catalogue now contains 7,068 items (up 36). Following the September and October uploads, the *Sonbanko* contains 657 items (up 72) and has had over 24,000 visits. The Olivier Tzaut Collection *Karnavaleto* is already proving popular.

I have also uploaded the Butler Linguaphone recordings by Edmond Privat. This kind of thing does get listened to, presumably by internet learners wanting to improve their pronunciation. UFE's course, spoken by Jean Thierry, also does well.

Sterling work by colleagues at Barlaston and subsequently has enabled me to add a reasonably serviceable page on Margaret Jones/ Blaise to the website. There have been 3 715 visits since the first posting at the new address 14 months ago, which is about $4\frac{1}{2}$ a day. Also a rare instance of inter-library cooperation, as colleagues in Aalen have suggested some improvements to the website, which I have implemented.

Geoffrey King, Hon. Librarian

Pasis aktivega jaro de JEB

www.jeb.org.uk

La pasinta jaro ŝajne estis la plej aktiva en la lastatempa historio de JEB.

Tendumado en Brajtono
La tendumadon en Brajtono sukcese organizis Clare. Naskiĝis la ideo dum la lasta jarkunveno en Llandudno, kiam la JEBanoj pridiskutis kiamaniere ebligi parolado-ekzercadon al tiuj malpli spertintaj. Oni decidis okazigi diskutrondo-sesiojn ĉe tendumada semajnfino, ĉar tiel ĉiuj plej facile trovos la monon por partopreni kaj ankaŭ havos la okazon viziti novan urbon.

Entute ĉeestis dek kvar homoj, inkluzive de tri el Francujo kaj virino el Svislando. Aparte plaĉa estis tio, ke novulo Vilfredo partoprenis sian unuan britan aranĝon. (Tamen ne sian tute unuan, ĉar malkutime li partoprenis unuapaŝe internacian eventon, ĉeestinte la Slovakan Esperanto-Semajnon iom antaŭe.)

Gvidis la tri diskutrondo-sesiojn Tim. Bonsorte la celo trafiĝis, ĉar ĉiu partoprenanto la okazon paroli havis, kaj niaj malpli spertintoj perfekte taŭge kaptis la momenton por elbuŝigi Esperanton. La grupa opinio estas, ke la temoj estis diskutindaj kaj facile kuraĝigis partoprenadon ... kio estas bona afero, ĉar tiujn tri temojn Tim reuzos (plus kelkajn pliajn) ĉe la Drondo okazonta ĉe Ni Festivalu en Barlastono de la 14a al la 16a de januaro.

Okazis ne nur diskutado, kompreneble. Sabaton ni vizitis Brajtonon, kie hungara esperantistino Stela Besenyei, kiu loĝas en la urbo, renkontis nin por montri al ni la ĉirkaŭaĵon. Mankis tempo por vidi eĉ la duonon, do plimulto revenis dimanĉon.

Partoprenantoj de la JEB-semajnfino pozas ĉe la tendumejo apud Brajtono.

Sukcesa eksperimento
Do la eksperimento sukcesis: ĉiu havis la okazon uzi sian Esperanton, ni ekskursis en nova loko, kaj partoprenis bona nombro. Ŝajne la tuta afero refarindas, tamen en alia angulo de la lando, kompreneble.

Londona kunveno Zamenhof-taga
Kutima – do, ĉetrinkeja – kunveno aktuale aranĝiĝas, ĉi-foje en Londono. Kvankam ni ankoraŭ ne certas pri la dato, temos pri unu el la du sabatoj, kiuj ĉirkaŭas Zamenhof-tagon. Taŭgus fini la jaron per eventeto, kies okazigo estas aparte celita por kongrui kun tiu grava dato en la Esperanto-kalendaro.

Bona sekvaĵo de la tendumado estas, ke homoj amikiĝis, inkluzive kun francino Julia Hédoux, kaj tiel Paul, Neil, kaj Dudu sciis, al kiu peti tranoktadon en Francujo. Julia jesis, kaj tiuj tri (kune kun la eterne juna Terry Watts) vojaĝis trans la Markolon por ĉeesti la 22an Eŭropan Rendevuon en norda Francujo, ĉe Stella Plage.

Ĉe la tendumeja Drondo-sesio. La diskuttemo estis "Ikonaj fotoj".

Refarbas la retpaĝaron
Moviĝante for de kunvenoj: Kutimaj vizitantoj al la *Jebsite* (nia retpaĝaro) baldaŭ rimarkos novan aspekton, ĉar Tim kaj Thomas prilaboras la tuton, por ĉion modernigi kaj aldoni pli da interesaĵoj. Kvankam la nuna restas en bona stato, ĝi pensigas pri 2007, do venis la tempo refarbi ĝin.

JEBanoj posteniĝas kaj laboras
Lastatempe sukcese kandidatis Jake Pentland por posteno Komitatano A de TEJO, do Britio nun havas ligigan oficiston inter la landa kaj internacia sekcioj.

Ĉiam pasintjare deĵoris JEBanoj ĉe la Lingva Festivalo en Londono. Estis same ĉi-jare, kiam reprezentis Esperanton el nia amikaro Marteno, Saŝa, Penny, Magnus ... kaj ankaŭ Terry Watts, kiu (pro sia ĉiutaga ĉeesto en la JEB-forumoj) estas honora JEBano, kaj kies tre pozitiva raporto legeblas aliloke en ĉi tiu numero.

Tia miksado inter JEBanoj kaj 'plenkreskuloj' ne estas tiel malofta kiel oni eble kredus. Tim (ne plu tiel juna, agnoskinde) kaj Clare (membro de la Administra Komitato de EAB, do en kontakto pli ofte kun homoj aĝe superintaj ŝin) kutime partoprenas semajnfinojn en Barlastono, kaj konservis la tradicion en oktobro, kiam ili partoprenis la 6an Drondo-semajnfinon, kiun gvidis Derek Tatton kaj Tim mem.

Bondezirojn al vi ankaŭ por ĝojiga kaj saniga 2011!

Tim Owen

Germanoj petas ligojn kun Scarborough

La ĉefo de la germana distrikto Osterode am Harz, s-ro Bernhard Reuter, inaŭguris novan kamionon kun unikaj surskriboj. Temas pri kvarlingva varbado: angla, germana, pola kaj Esperanta kontraŭ rasismo (*vidu sube*). La nova kamiono traveturos Eŭropon. Pro la neŭtraleco kaj vera internacieco, oni elektis Esperanton kiel la plej okulfrapan lingvon. S-ro Reuter emfazis la gravan signalefikecon.

Projektgvidanto Thiemann kun reprezentantoj de Interkultura Centro Herzberg Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar antaŭ la kamiono

Osterode am Harz havas la ĝemelurbojn Scarborough en Britio kaj Ostróda en Pollando. Oni petas, ke lokaj esperantistoj anoncu sin kaj serĉu kontakton kun Interkultura Centro Herzberg (ICH)/Germana Esperanto-Centro, D-37412 Herzberg/Harz – la Esperanto-urbo, Grubenhagenstr. 6, tel. +49/(0)5521-5983; retpaĝaro: www.herzberg.de.

Krome, la subdistrikto varbas kontraŭ rasismo per granda germanlingva kaj Esperanta slogan-afiŝo (*vidu pliajn fotojn sur la sekva paĝo*).

"Dank' al persista kaj amika interlaborado, oni pli kaj pli komprenas en nia regiono la gravecon de Esperanto", raportas ICH.

A 'Bright' Day in Maldon, Essex

Autumn trees flamed against an azure sky on 30 October 2010 when members and friends of the *Orienta Federacio* met in Maldon. The challenge from President Roy Threadgold was to find out why Maldonian Edward Bright was famous, and translate the information into Esperanto.

Clues were given as to where to look – the local museum, church, shopping arcade, etc. Edward Bright lived from 1721 to 1750. He was famous for his enormous weight – the heaviest man in England at that time! He weighed 44 stone. A claim was made that 700 men could be buttoned up inside his waistcoat. A bet was won when seven 'hundredmen' easily got inside. The photograph (*right*) shows some of the Esperantists looking at a sculpture of these seven 'hundredmen'.

A programme of discussions, puzzles and stories – all in Esperanto, of course – to which everyone present contributed, ensured the day was enjoyable.

(What's a hundred? A hundred was a traditional division of an English county, consisting of a group of parishes. They were smaller than the later Registration Districts introduced in 1836.)

Joyce Bunting

Pli da fotoj el la germana kampanjo 'Bunteco bonas'

Supre: *Varbafiŝo "Kontraŭ Rasismo" en la "Komuna" lingvo Esperanto antaŭ la administrejo de la germana distriko Osterode am Harz*
Dekstre: *La inaŭgura festo de la 19a de novembro por la nova kamiono, komisiita por reklami internacian kompreniĝon kaj agadon kontraŭ rasismo enkadre de la projekto 'Bunteco bonas'.* *(Vidu artikolon sur paĝo 15.)*

Esperanto-aranĝoj

☆ **Plena listo de aranĝoj** estas konsultebla ĉe la retpaĝaro *www.eventoj.hu.* Se vi deziras rigardi mapon de aranĝoj, iru al: *www.esperantoland.org*

14–16 januaro
'Ni festivalu!' – eblo por ajnaj grupaj renkontiĝoj, kio inkluzivas precipe 'Ni teatrumu!' – staĝon pri Esperanta teatro, Barlastono, Britio. Inf.: EAB, tel. 0845 230 1887; rete: eab@esperanto-gb.org

14–16 januaro
'Drondo', Barlaston, Britio. Semajnfina Esperantlingva diskutrondo (por progresintoj) pri diversaj temoj. Inf.: EAB (vidu supre aŭ paĝon 2).

15 januaro
Esperanta Sabato, Vannes, Francio. Venu esperantumi gramatike, lude, teatre kaj gimnastike. Inf.: Esperanto-Vannes, 20 place Fareham, FR-56000 Vannes; rete: esperanto.vannes@hotmail.fr

29–31 januaro
Nov-Zelanda Kongreso de Esperanto, Wellington, Nov-Zelando. Inf.: nzea@esperanto.org.nz

19 februaro
Esperanta Sabato, Vannes, Francio (vidu supre).

26 februaro–5 marto
Mediteranea Esperanto-Semajno, Agay – Lazura Marbordo – Francio. Kursoj, ekskursoj, ripozo, distriĝoj. Inf.: Monique Prezioso, 92 alleé des Harkis, FR-83700 Saint-Raphael; rete: prezmoni@hotmail.com; tel.: +33 (0)4 94 83 06 88

26 februaro–9 marto
9a Internacia Himalaja Renkontiĝo, Katmanduo, Nepalo. Inf.: S-ro HORI Jasuo, Simosinden 10-27, Maebasi-si, JP-371-0822 Japanio; rete: horizonto@water.sannet.ne.jp

12–13 marto
Vintraj Tagoj, Tampere, Finnlando. Inf. rete: eafsekretario@esperanto.fi

18–20 marto
Veganisma Semajnfino, Antverpeno Belgio – en pluraj lingvoj, inkluzive de Esperanto; kun veganismaj kuirlecionoj. Inf.: Lode Van de Velde, rete: lodchjo@yahoo.com

19 marto
Esperanta Sabato, Vannes, Francio (vidu supre).

1–3 aprilo
La 6a Sabla Printempo, Milevsko, Ĉeĥio. Inf.: pisek@esperanto.cz

8–10 aprilo
92a Brita Kongreso de Esperanto, Eastbourne, Britio. Inf.: EAB (vidu supre).

11–16 aprilo
Lingva seminario, Skokovy, Ĉeĥio. Aranĝo de Asocio de Esperantistaj Handikapitoj, sed ne nur por handikapitoj. Inf.: nechvilep@seznam.cz

16 aprilo
Esperanta Sabato, Vannes, Francio (vidu supre).

18–23 aprilo
11a Internacia Esperanto-Konferenco, Wuhan, Ĉinio. Kun antaŭaranĝo en Pekino. Temo: 'La ĉina ŝaĝo'. Inf. OSIEK, rete: kasisto@osiek.org

22–26 aprilo
Inter-asocia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo, Seto, Francio. Kunorganizata de SAT-Amikaro, Espéranto-France kaj pluraj societoj. Inf.: LOKO, 13bis rue Haute, FR-30310 Vergèze; rete: info@esperantosete2011.fr

29 aprilo–9 majo
23a Aroma Jalto, Ukrainio. Esperanto-festivalo, kies celo estas plialtigi lingvonivelon de partoprenantoj kaj konatigi ilin kun belega naturo de Krimeo. Inf.: Volodimir Hordijenko, p/k35, Kiev-133, UA-01133; rete: volodomir@ukr.net

30 aprilo–7 majo
32a Tutpollanda Esperanto-Kongreso, Nowy Sącz, Pollando. Inf.: Pola Esperanto-Asocio, Aleja Wolnośći 37 F 7-8, PL-33-300 Nowy Sącz.

7–14 majo
63a Kongreso de IFEF (fervojistoj), Liberec (kongresejo Babylon). Inf. rete: ladislav.kovar@tiscali.cz

21–23 majo
8a Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto, Kingston, Ontario. Turisma amikeca semajnfino. Inf.: Esperanto-Klubo de Kinstono kun Esperanto-Societo Kebekia, 6358 de Bordeaux, Montréal, Québec, H2G 2R8; rete: informo@esperanto.qc.ca

1–5 junio
Printempa BARo, Bad Münder, Germanio. En arbaro, tial ideala por

La problemoj. La solvoj. La rolo de planado en la homa komunikado. Kaj la kontribuo de Esperanto.

• **Redaktoroj:** *Probal Dasgupta, Humphrey Tonkin.* **Recenzredaktoroj:** *Frank Nuessel, Federico Gobbo. Interlingvistika redaktoro: Mark Fettes.*

• **Ekzemple, la enhavo de la aŭtuna numero de 2009: Artikoloj: "Language policy and legislation in post-Soviet Azerbaijan", "International languages and education in Botswana and Malawi: A comparative study", "Wikipedia and lesser-resourced languages", "Causes of the relative success of Esperanto" – with extensive reviews of recent books.**

• **Eldonas:** *John Benjamins, Postbus 36224, NL-1020 ME Amsterdam, Nederlando. ISSN 0272-2690.*

• *Abonu pere de la Libroservo de UEA (laŭdezire ankaŭ pere de la Libroservo de EAB). Aperas trifoje jare. Individua abono: 70 eŭroj. Institucia abono: 202 eŭroj.*

familioj kun infanetoj. Inf.: Andi Münchow, Oberstraße 15, DE-30167 Hannover; rete: andim@gmx.li

10–17 junio
Esperanto-kursaro, Heinävesi, Finnlando. Tradicia kursosemajno en la Popola Instituto de Valamo, Heinävesi (12–17 junio); ĉiuj kursoniveloj; antaŭekskurso. Inf.: Esperanto-Asocio de Finnlando; rete: eaf@esperanto.fi

19 junio
Tradicia montopinta renkontiĝo (jam dum 75 jaroj!) de ĉehaj, polaj kaj slovakaj esperantistoj sur la pinto de la monto Ĉantorio ĉe la ĉeha–pola landlimo. Info: suchanekj@seznam.cz

3–10 julio
Internacia Junulara Lingvotendaro, Jászberény, Hungario. Atm lernado, ptm ekskursoj kaj plaĝumado. Inf.: Harnyos Ferenc, rete: hferenc@pr.hu

3–16 julio
59a Somera Esperanto-Tendaro, unua etapo en Lančov, apud Vranovlago. Inf. rete: podhradska@volny.cz

9–14 julio
46a Brazila Kongreso de Esperanto, San-Paŭlo, Brazilo; **8a Tutamerika Kongreso de Esperanto**, temo 'Procezoj de regiona integriĝo en la amerika kontinento: la rolo de Esperanto'; **Brazila Junulara Kongreso**. Inf.: San-Paŭla Esperanto-Asocio, rete: sudstelaro@gmail.com

9–17 julio
Jubilea Kongreso de Aŭstralia Esperanto-Asocio, Adelajdo. Cent jaroj de Esperanto en Aŭstralio; prelegos i.a. H. Tonkin kaj T. Steele; koncerto de JoMo, konkursoj, ekskursoj k.a. Inf.: Katja Steele, 143 Caulfield Ave., Clarence Gardens, SA-5039, Aŭstralio.

12–16 julio
Internacia Natur-amika Renkontiĝo: 'Miraklo de duno kaj aer-miraĝo', Suda Gobio, Mongolio. Unua renkontiĝo por la esperantistoj en la suda parto de Mongolio. Ekkonu vivkutimojn de kamelbredistoj kaj ĉevalistoj, ĝuu belan pejzaĝon kaj iom da ĉevalrajdado. Inf.: Batzaya, Poŝta Kesto 57, Ulaanbaatar, NM-10646; rete: batzaya@rambler.ru

14–21 julio
67a Internacia Junulara Kongreso (IJK), Hlibivka, apud Kievo, Ukrainio. Ĉe la plej granda akvorezervejo de Eŭropo. Venu naĝi en la lago, viziti la proksiman ĉefurbon, kaj ĝui la naturon en Esperanta junulara etoso. Inf.: Ukrainia Ligo de Esperantista Junularo kaj TEJO, Mikaelo Lineckij, tel. +38 (044) 223-12-55; poŝtel. +38 (063) 849-31-93; rete: ijk-67@ukr.net

New Members of EAB

Geoffrey Clements, Darwen
Neil Conroy, Llandudno
W.F. Howliston, Brighton
Andrew Jackson, Derby
Jake Pentland, Durham
Jonathan Webley, Newton Mearns

Deceased members

Jeanne Day, Totnes
Catherine Preston, Bristol

Congratulations
Completed the *Free Postal Course*

Joan Butler, Saltford
David Fuller, Bath
Stephen Medgyesy, Chellaston
Andy Pepperdine, Bath
Richard Phillips, Bath
Rafal Stankiewicz, Haywards Heath

Obituary – Nekrologo

Catherine Preston (née Rhydderch) passed away on 28 September, aged 95. She was born in South Wales and moved to Bristol in the 1950s, living in Ashley Down, then Fishponds, and finally Westbury on Trym.

Through Esperanto she made many life-long friends and met her husband to be, Leigh Preston. They were married in 1956 and spent 17 happy years together. Her belief and fluency in Esperanto continued throughout her life – she gave me a language lesson while sitting in the nursing home about a year ago. Amongst her papers are innumerable letters from Esperantists she had met on frequent visits overseas, and a souvenir of an unforgettable performance of *La Piratoj de Penzanco (aŭ Sklavo de la Devo)* by Gilbert and Sullivan as part of the British Esperanto Congress in July 1979. Catherine was amongst the 'Ĥoro de la piratoj, policanoj, kaj la filinoj de Generalo Stanley'.

Many thanks from her family to all members who knew her and wrote to her.

Gwyn Winter

"The word "monumental" is bandied about, but one wishes it were kept … for occasions like this. …

Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto

is a remarkable achievement, a compendious milestone of a reference book that promises to bring a neglected literary tradition new readers and foster new scholarship." Esther Schor, Professor of English at Princeton University, Language Problems & Language Planning*, Vol. 33, No. 3, 2009.*



- Preface by Dr. Humphrey Tonkin, Professor of the Humanities and President Emeritus at the University of Hartford, Connecticut
- General introduction to Esperanto literature, its history, evolution and modern development
- Individual introductions to the five periods of the literature
- Over 300 individual articles on the most important writers and their work in chronological order, with biographies and critique
- Sample literary texts from some of the best original authors
- Introduction to the language itself, its linguistic structure and creative capabilities, including *Esperanto from the Viewpoint of a Writer* by Claude Piron
- Extensive bibliographies and index

Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto 1887-2007 by Geoffrey Sutton. New York, NY: Mondial, 2008. x + 728 pages. Format: 6″ x 9″ (152 x 229 mm). ISBN 978-1-59569-090-6. Price €66.00 + p.&p.

• **Place your order** online at <www.librejo.com/enciklopedio>, by fax (+1-208-361-2863), or by e-mail: informo@librejo.com. Mondial will respond promptly with information on the various means and prices of carriage. **Mondial** (Ulrich Becker), 203 West 107th Street, Apt. 6 C, New York, NY 10025, USA.

Resale outlets should contact Mondial (informo@librejo.com) to agree a price. Pay only after agreement on the cost of carriage. Payment may be made by US bank cheque in US$; or by giro to a bank in Germany; or to Mondial's account at UEA, Netherlands. **Also available from EAB at £52.80 including postage and packing.**

14–21 julio
Kongreso de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj, Olomouc, Ĉeĥio. Inf.: priborsky@braillnet.cz

17–30 julio
59a Somera Esperanto-Tendaro, dua etapo en Lanĉov apud lago Vranov. Inf. rete: podhradska@volny.cz

23–30 julio
96a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando. Inf.: EAB kaj UEA (vidu paĝon 2).

30 julio–6 aŭgusto
4a INA-Konferenco – la signifo de naturkuracado, Herzberg am Harz, Germanio. Inf.: Internacia Naturkuraca Asocio (INA), Harald Schicke, Hauptstr. 38, DE-37412 Herzberg am Harz, Germanio; rete: info@ginseng-laden.de

30 julio–6- aŭgusto
84a Kongreso de SAT, Sarajevo, Bosnio-Hercegovino. Inf.: 84a SAT-Kongreso, Kralja Tvrtka 19, BA-71000 Sarajevo; rete: satkongreso@esperanto.ba; tel/fakso: +387-33-205487

31 julio–13 aŭgusto
59a Somera Esperanto-Tendaro, 3a etapo en Lanĉov apud lago Vranov. Inf. rete: podhradska@volny.cz

1–7 aŭgusto
Piedmarŝo 'Milan Zvara' en Karpatoj, Ukrainio. Komenciĝos de la vilaĝo Dovhe; finiĝos en Hoverla, la plej alta monto de Ukrainio. Inf.: Volodimir Hordijenko, p/k 35, Kijiv-13, UA-01133; retpoŝte: volodomir@ukr.net

2–9 aŭgusto
61a Kongreso de KELI, Poděbrady, Ĉeĥio. Inf.: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady; rete: cea.polnicky@quick.cz

6–14 aŭgusto
Amika Rondo, Niĵnij Tagil, Ruslando. Kun ekskursoj, amuzaj lecionoj ktp. Inf.: Larisa Kuzmenko, rete: klarisa8@yandex.ru; www.k9698.narod.ru

9–17 aŭgusto
FESTO – Mojosa junulara festivalo, Francio. Inf.: JEFO (Junulara Esperantista Franca Organizo); retpoŝte: alekcxjo@gmail.com

12–14 aŭgusto
Renkontiĝo de iamaj partoprenintoj de Someraj Esperanto-Tendaroj, Lanĉov, Ĉeĥio. Inf. rete: podhradska@volny.cz

15–19 aŭgusto
51a Somera Festivalo – kunludu kaj kunstudu en Barlastono, Britio. Dunivela kursaro kun la eblo turismi aŭ private studi/esplori en Biblioteko Butler. Inf.: EAB, tel. 0845 230 1887 (vidu ankaŭ paĝon 2).

15–21 aŭgusto
21a KISO, Marburg, Germanio – "ludi, krei, sperti vin mem". Inf.: Gunter Neue, Marburga Esperanto-Grupo, Afföllerstr. 19, DE-35039 Marburg/Lahn; rete: kiso@esperanto.de.

20–27 aŭgusto
78a Itala Kongreso de Esperanto, Torino, Italio. Temo "Kaj nun ni estu eŭropanoj!" Inf.: Itala Esperanto-Federacio, rete: itala.kongreso@gmail.com.

11–18 septembro
Ekotur 11 – tradicia ekoturisma

renkontiĝo por biciklantoj kaj piedirantoj en Dobřichovice (vojplanoj en Bohemia Karsto kaj monteto Brdy), Ĉeĥio. Inf. rete: chrdle @kava-pech.cz.

7–9 oktobro
Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Šumperk. Inf. rete: Tomecek @esperanto.cz

7–11 oktobro
Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio, apud Seulo, Koreio. Temo "Esperanta amikeco kaj interkompreniĝo trans la maro". Inf.: Syozi Keiko, Tegmenta Komisiono por la Komuna Kongreso de Japanio kaj Koreio (TEKO), rete: jek11s@jei.or.jp

20–23 oktobro
Rusia Esperanto-Kongreso (REK-27), Ĉeboksari. Inf. rete: kongreso @reu.ru; www.reu.ru + **Internacia Lingva Festivalo**, Ĉeboksari. Tradica aranĝo organizata de esperantistoj por ne-esperantistoj, traktante lingvajn temojn. Inf. rete: al.blinov@gmail.com

21–23 oktobro
'Course-You-Can', Wedgwood Memorial College, Barlaston, Staffs., Britio. Kurso ĉefe por anglalingvaj komencant/intoj (okazos samtempe kun Esperantlingvaj diskutrondoj **'Drondo'** – *Spertuloj kunvenigu nespertulojn*). Inf.: EAB (vidu paĝon 2).

2012
13–15 januaro
'Ni festivalu!', Wedgwood Memorial College, Barlaston, Staffs., Britio. Eblo por ajnaj grupaj renkontiĝoj, kio inkluzivas precipe 'Ni teatrumu!' – staĝo pri Esperanta teatro. Inf.: EAB (vidu paĝon 2).

16–20 majo
Printempa BARo, Bad Münder, Germanio – en arbaro, tial ideala por familioj kun infanetoj. Inf.: Andi Münchow (vidu supre).

19–21 majo
9a Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto, Kebeko, Kanado. Inf.: Esperanto-Societo Kebekia, 6358 de Bordeaux, Montréal, Québec H2G 2R8; rete: informo@esperanto.qc.ca

julio
97a Universala Kongreso de Esperanto, Hanojo, Vjetnamio. Inf.: EAB kaj UEA (vidu paĝon 2).

Fondaĵo Canuto

Multaj esperantistoj tra la Tria Mondo arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpos al UEA teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj, ekzemple en evolulandoj.

EAB povas senpage plusendi vian donacon al UEA. Bonvolu klare mencii "Por Fondaĵo Canuto".

Antaŭdankon pro via solidareco!



Ĝisdatiĝu per

John C. Wells

English–Esperanto–English Dictionary (Angla–Esperanto–Angla Vortaro)

Ampleksa sed konciza ambaŭdirekta vortaro por komencantaj kaj progresintaj studantoj de Esperanto, kun enkonduka prezento de la gramatiko de Esperanto

Unue publikigita en 1969 de la eldonejo Hodder kiel *Teach Yourself Concise Esperanto and English Dictionary*, la nuna, dua eldono estas zorge reviziita kaj komplete reverkita. Ĝi plene spegulas la hodiaŭajn anglan lingvon kaj Esperanton.

Kun entute pli ol 30 000 kapvortoj, ĝi estas nemalhavebla riĉfonto por uzantoj de Esperanto, tenanta ĉiujn vortojn, kiujn oni bezonas, inkluzive de multaj fakvortoj.

Eldonas: Mondial (Novjorko), 2010 (Broŝurita versio: ISBN 978-1-59569-149-1; Malmole bindita versio kun kromkovrilo: ISBN 9781595691507). Ambaŭ: 508 paĝoj (xlvi + 462). Grando 5.5 x 8.5" (14 x 21,6 cm). Por pli da informoj vizitu la retpaĝaron: www.librejo.com/wells-vortaro.

• ***Vendoprezoj ĉe EAB:*** Bv. noti, ke la broŝuita eldono restos je la sama avantaĝa enkonduka prezo de £15 ĝis la 1a de marto 2011, la bindita kostas £29, plus sendokostoj po 15%. Reta butiko: www.fastcart.co.uk/cart/index.php?id=9449&item=Wells+Dictionary – aŭ telefonu al 0845 230 1887.